

# Esperanto en universitatoj



Post la unua leĉiono de Esperanto, 28-an de septembro, 2018, antaŭ Esperanto-Muzeo

## Malfermiĝis Esperanto-fako en la Universitato Zaozhuang

■ Bak Giwan

La Universitato Zaozhuang (<http://www.uzz.edu.cn>) en la urbo Zaozhuang, Shandong, Ĉinio, oficiale malfermis 4-jaran bakalaŭran kurson de Esperanto ekde la aŭtuna semestro de la kuranta jaro, 2018, kun la permeso de la ĉina ministerio pri edukado kaj kun la subteno de ĈEL. Ĝi apartenas al la fakultato de fremdaj lingvoj, kaj ĉi-jare ĝi varbis entute 25 studentojn.

Ĝi estas la unua 4-jara bakalaŭra kurso en Ĉinio, kaj nuntempe kredeble unu sola tia kurso en la mondo(?). Studentoj de la kurso lernas ne nur Esperanton, sed ankaŭ la anglan lingvon (fremdlandaj studentoj lernas an-

kaŭ la ĉinan) kaj ekonomikajn lecionojn. Post sukcesa 4-jara lernado ili ricevos bakalaŭran diplomon de literaturo kun la mencio de la fako "Esperanto".

Nun en la universitato funkcias Esperanto-Muzeo malfermita en 2013, kaj de 2011 Esperanto estas daŭre instruata kiel elektebla lernobjekto fare de s-ro Sun Mingxiao (Semio) kaj d-ro Sasaki Teruhiro (japano). Nun s-ro Sun Mingxiao, kiu sindone kaj sukcese laboris por la starigoj de la muzeo kaj la Esperanto-fako, laboras kiel ĉefdeĵoranto de la muzeo.

Kaj en la universitato ekde 2016 kune laboras ankaŭ d-ro Bak Giwan (koreo) kaj s-ro Sato Ryusuke (japano), instruante Esperanton kaj gvidante Es-

peranto-rondon de studentoj. Oktobre 2018 venis d-ro Maciej St. Zieba el Pollando kaj kune instruos en la Esperanto-fako. Kaj d-ro Sasaki, kiu laboris dum 6 jaroj en la universitato kiel profesoro de Esperanto kaj la rusa, revenis al Japanio en la lasta junio.

La Esperanto-fako ĉi-jare varbis studentojn nur el la provinco Shandong, sed oni planas varbi studentojn el la tuta lando, kaj ankaŭ fremdlandajn studentojn el la tuta mondo ekde la venonta jaro. Se vi havas intereson pri lernado de Esperanto kaj la ĉina lingvo (ankaŭ ĉina kulturo) kaj ankaŭ pri diplomiĝo pri Esperanto, vi povas kontakti: [zzxygjc@163.com](mailto:zzxygjc@163.com) (Internacia fako de la universitato).

## UEA invitas prelegi en la IKU-sesio en Lahtio



Kadre de la 104-a UK en Lahtio okazos la 72-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas profesorojn, docentojn kaj personojn kun similaj kvalifikoj sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU rete ([amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il)) aŭ paperpoŝte: prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-7179901 Modiin, Israelo. La proponoj alvenu plej laste la 31-an de januaro 2019. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu prelego kadre de la IKU kaj el du kromaj prelegoj. Tiukaze bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso. La

prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝon. Proponoj kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos tamen esti utiligitaj en aliaj kadroj, kiel Scienca Kafejo. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de 260 EUR. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de teksto por la IKU-libro kaj duono – de la efektiva okazigo de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU: <http://www.uea.org/kongresoj/universitato>.